# *Ratifas ministro de defendo ke Irano firme respondos ajnan teroristan agreson*



Teherano, nov 30 (RHK) La ministro de defendo irana, Amir Hatami, asertis ke Irano ne toleros murdojn de siaj sciencistoj kaj firme respondos ajnan krimon a? teroristan agon.

“La malamiko perfekte scias, kaj mi kiel soldato tion diras, ke neniu krimo, neniu terorista ago kaj neniu stulta?o restos senresponda flanke de la irana popolo: ni persekutos la krimulojn ?is la fino”, avertis Amir Hatami.

Dum parolado en la funebra ceremonio de la nuklea sciencisto irana, Mohsen Fajrizade, murdita vendrede dum terorista atenco proksime de la ?efurbo, Hatami reemfazis ke la agresemo kaj minacoj de la malamikoj ne povos haltigi la progreson de la lando.

La ministro avertis ke la celo de tiu ?i krimo estas subfosi la unuecon de la persa popolo, sed la intelektaj a?toroj de la atenco ne sukcesis je tio. Krome, li denuncis ke la silento de kelkaj landoj kaj internaciaj organismoj fronte al tiu ?i atenco stimulas la teroristojn plu agi krime en la mondo.

Fonto: HispanTv

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/241110-ratifas-ministro-de-defendo-ke-irano-firme-respondos-ajnan-teroristan-agreson

**Radio Habana Cuba**